monaĥejo). Dum unu jaro, depost oktobro 1929, la muzeo akceptis 198 000 vizitantojn (kontraŭ 72 000 dum pasinta jaro).

Grandegan kontraŭreligian laboron ankaŭ efektivigas tra USSR lokaj kontraŭreligiaj muzeoj k kontraŭreligiaj fakoj de lokaj muzeoj. Multnombraj informoj konstatas, ke vizit-elcento al kontraŭreligiaj muzeoj okupas inter ĉiuj muzeoj la unuan lokon.

### Migrantaj kontraŭreligiaj ekspozicioj

En 1930 Centra kontraŭreligia Muzeo en Moskvo organizis 6 migrantajn kontraŭreligiajn ekspoziciojn, kiuj estis direktitaj al diversaj partoj de USSR, k krom tiuj 9 pri iuj temoj ekspoziciojn (por kongreso k agitado), uzitajn parte senpere en la Muzeo mem, parte direktitajn kun speciala destino.

La migrantaj ekspozicioj faras longedaŭrajn veturadojn tra diversaj partoj de USSR priservante vastajn amasojn da laboristoj k kamparanoj. La ekspozicioj estas akompanataj de kvalifikitaj lektoroj de CK de UMA.

La ekspozicioj kutime elvokas grandan intereson ĉe la amasoj k helpas plivigligon de kontraŭreligia laboro en periferio.

### En religi-kulaka tendaro

Kiel antaŭe plejajn fortostreĉojn en sia batalo kontraŭ la socialisma konstruado la religi-kulaka kontraŭsoveta tendaro direktas por malhelpi konstruadon k laboron de kolĥozoj, kontraŭ la aranĝoj de l' soveta potenco por sufiĉa liverado al Sovetlando de pano k ceteraj nutraĵproduktoj.

En Ŝadrinska distrikto de Urala landparto eklezianoj forte admonas kredantojn eliri el kolĥozo, promesante "la unuan lokon en paradizo al tiuj, kiuj forlasos la kolĥozojn k konsilos fari la samon al kamaradoj".

En vilaĝo Kamenskaja de Petuĥa distrikto (Urala landparto) la kulakoj timigas la malkleran kredantan loĝantaron per fabeloj pri tio, ke en kontoron de apuda kolĥozo dumnokte alflugas "nigra serpento havanta grandegajn flugilojn k akrajn ungegojn".

En kolĥozo je nomo de Iljiĉ (Ĉerkasa distrikto de malsupra Volgalando) sektanoj provis malhelpi laboron de nove-liveritaj traktoroj, verŝante en benzinon malpuran akvon k difektante magneton. Tiel kulakoj celis ĝustigi siajn profetajojn, ke dio ne permesos "al kontraŭkristaj maŝinoj" kulturi ateistan kolĥozan teron. La traktoroj estis restarigitaj k sukcese plugis kolĥozajn areojn; al religi-kulakaj fabeloj estis farita decida bato.

En vilaĝo Pirma de l' Koĉkurova distrikto en Mordva aŭtonoma lando monaĥino disvastigis famojn pri tio, ke al ŝi aperis en sonĝo "sankta Serafimo de Sarovo" k avertis, ke ĉiujn, kiuj aliĝos al kolĥozo, mortigos fajra pluvo.

En vilaĝo Muraevo de l' Milislava distrikto en Moskva lando agitis kontraŭ kolektivigo en la vilaĝon veninta pilgrimo. Laŭ liaj diroj kolĥozo malriĉuligis cent familiojn, enkalkulante ankaŭ sian. "Ne kolerigu dion, vokis la pilgrimo, ne aliĝu al diabla kolĥozo, ĉar tiel same vi iros en mondo kun almozulsako". Oni eksciis, ke la pilgrimo neniam estis kolĥozano, sed ĝis lasta tempo servis kiel psalmanto en unu el la preĝejoj, kiujn likvidis en kolĥozo unuiĝintaj vilaĝanoj.

Furiozan agitadon aranĝas eklezianoj k sektanoj kontraŭ vasta partopreno de laboruloj en agitado por reelekto de sovetoj. Ekz., en Novozibkova distrikto de okcidenta landparto pastroj konvinkas kredantajn virinojn ne viziti reelektajn kunvenojn, ĉar ili estas malplaĉaj por dio k partoprenontoj en ĝi suferos en "transmondo" gravegan punon.

Pastro de l' vilaĝo Tiĥonovo en Ivanova landparto de preĝeja katedro vokis al kredantoj: "Ne iru al reelektoj. Printempe Francio militos kontraŭ Sovetojn k severege punos Sovetanojn".

### Revoluciemaj Ateistoj Tutmondaj

Meze de marto (13-an k sekvantajn tagojn) okazos en Germanio la regna kongreso de proletaj liberpensuloj. La 14-an de marto ni malfermas nian IFA-Kulturschau (Ekspozicio de Interes-societo por Laborista Kulturo), kiun partoprenos la organizoj de liberpensuloj, esperantistoj, radio- k foto-amatoroj, agitproptrupoj, marksisma laborist-lernejo, artistoj: pentristoj, aktoroj, revoluciemaj verkistoj, libro-eldonejoj ktp. Liberpensul-kongreso k ekspozicio okazos en Lajpcig.

Fortigu per alsendo de viaj batalsalutoj, per letero, poŝtkarto aŭ telegramo en esperanto la batalon, kiun gvidas la revoluciemaj liberpensuloj k la aliaj kulturorganizoj laboristaj kontraŭ reakcio k faŝismo. Aldonu al viaj skribaĵoj koncizan raporton pri viaj lokaj cirkonstancoj kun bildoj. Ni publikigos ĉion resume en taggazeto k Proleta Liberpensula Voĉo. Sendu ĉion ĝis 12-a de marto al: Rudolf Hartig, Leipzig S 3, Arndtstrasse 43. (Sub nomo Hartig skribu: Por Reichskongress)

# TRA ESPERANTIO

## Resuma raporto pri la jaro 1930 de la Federacio de Lab. Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo

La pasinta jaro ne estis senvalora por la nederlanda laborist-esperantista movado. La Federacio de lab. esperantistoj plifortiĝis. La jaron 1930 ĝi eniris kun 22 sekcioj, kiuj havis 380 membrojn, k krome kun 30 ĝeneralaj membroj en lokoj, kie ne estas sekcio de la Federacio. Plie estas enskribitaj 32 simpatiantaj membroj k 9 simp. organizoj. Sen la organizoj, la Federacio nombris 442 membrojn. La jaron 1931 ĝi eniris kun 37 sekcioj nombrantaj 780 membrojn, krome kun 70 ĝeneralaj membroj, 260 simpatiantaj membroj k 23 simp. organizoj, sume (sen la simp. organizoj) 1110 membroj. La kreskado en la lastaj jaroj daŭris ĝojige. Ci-jare ekfunkciis 50 kursoj, kiujn sume partoprenis pli ol 1300 kursanoj; dum ekster la Federacio estis aranĝitaj kun la helpo aŭ almenaŭ per ia kontakto kun la Federacio 9 porlaboristaj kursoj, kiuj nombris sume 200 kursanojn.

Nia organo havis en la komenco de la jaro 1930 eldonkvanton de 1000 ekzempleroj, dum en ĉi tiu jaro la eldonkvanto plialtiĝis ĝis 2000, do duobliĝis. Estas ĝojiga fakto, ke efektiviĝis la pli ofta apero de nia organo: En la jaro 1931 ĝi aperas ĉiu-dekkvartage en pli granda formato (la sama formato kiel "S-ulo"). En la jaro 1930 ĝi regule aperis ĉiumonate, k estis aldonita la ĉiumonata gazeto "La Lernanto". Sume ni donis 202 paĝojn (formato "La Lernanto").

Ni en kunlaboro kun la aliaj nederlandaj esperantist-organizoj prizorgis gazetar-servon, kiu bone funkciis k per kiu ni publikigis poresp-ajn komunikojn en la nederlanda gazetaro bonefike. Per tiu servo estis publikigitaj 2060 artikoloj en 880 gazetoj.

La "Konvencio" estis laŭpove plenumata: dum tiu ĉi jaro multajn el niaj anoj ni aligis al SAT; bedaŭrinde, ankoraŭ ne ĉiuj niaj anoj trovis la vojon al SAT. Same ankoraŭ ne ĉiuj SAT-anoj holandaj sentas la neceson: "ĉiuj laboristoj estu en unu laborista organizo."

Ĉiel ni klopodis propagandi. Krom nia valora organo ni eldonis 51 000 propagandajojn, kiuj en la antaŭa jaro estis disdonataj. Ni aranĝis 10 poresp-ajn ekspoziciojn, kiuj estis bonege vizititaj k precipe celis antaŭpreparon por la kursoj. Ni partoprenis kelkajn laboristajn manifestaciojn, en kiuj ni per flagoj k tukoj kun devizoj propagandis por esp-o. En Amsterdamo, en la manifestacio kontraŭ la ŝiparleĝo ni